# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



PLENUMITA 06/01/2022 Kvincentsesdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*
*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

## Entute 797,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas 291,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 216,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 183,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 107,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde aprilo 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn.

Omicron science, good news - YouTube



la esperanta retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



VAKCINO: TRADICIE POLEMIKA AFERO

4a januaro 2022

# INTERNACIA LITERATURA ESPERANTA KONKURSO

**"HRISTO GOROV-HRIMA" – 2022**


Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por ***rakonto kaj eseo.***

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton kun supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj retadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj

**La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.**

***Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 31-a de oktobro 2022 al adreso/ e-mail: modest@abv.bg aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario***



informas AE *Heather Heldzingen*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

# Historio de la faktoj de mia vivo.



Mi ĉisube donas, al la homara esperantistaro ĉie ajn, la elstaraĵojn de mia vivo. Mi dediĉas ilin por ke oni ĉerpu el ili uzindaĵojn, kaj krome por montri la valoron de mia vivo.

Mi naskiĝis je la dato de 4 Decembro 1917, en Amsterdamo en Nederlando, verŝajne la plej bela urbo en la mondo. Miaj gepatroj loĝis en la subtegmentejo de patricia domo inter la kanaloj, tiel ke ili povis vidi la konatan Westertoren (Okcidenta Turo) ĉe la rando de la

urbcentro. Mia patro estis artisto, precipe (la en Nederlando plej klera) lignoskulptisto. Mia patrino venis de la holanda bulboregiono inter Amsterdamo kaj Roterdamo.

Miaj gepatroj estis operamantoj, kaj volis fari la samon kion faris la gepatroj de la fama franca enpersonisto Marcel Marceau, nome doni al mi la nomon "Marcel" de la pentristo en la opero La Bohême. Sed neniu en Holando tiutempe havis tiun francan nomon, kaj tial la oficistoj de la urbo Amsterdam rifuzis doni al mi tiun nomon. Sed la saman tagon miaj gepatroj portempe ekloĝis en apuda vilaĝo, en kiu loĝis multaj artistoj, kaj tiu vilaĝo (Laren-Blaricum) enskribis min kiel Marcel.

Nelonge post mia naskiĝo mia patrino malsaniĝis per la t.n. hispana influenzo. Ŝi estis ege malsana, kaj nia kuracisto ne plu volis trakti ŝin, ĉar "ŝi certe mortos baldaŭ". Li trovis prizorgi ŝin perdo de sia tempo, kaj lasis ŝin tia. Sed mia patro konis viron, kiu ne sukcesis en siaj medicinaj studoj sed estis tre klera kaj helpema. Tio faris lin fama. Li oferis peni ĉe mia patrino. Li faris laboron kiun oficiala kuracisto ne faris: li sidis dum longa tempo kaj laboris forte inciti la vezikon ellasi sian urinon. Fine li sukcesis kaj post la pisado mia patrino resaniĝis. Li akceptis pagon nur se oni havis la monon. Kia diferenco kun niaj riĉegaj specialistoj nun.

En tuta Eŭropo oni komplete elradikis el tiu kontinento tiun malsanon, kontraŭe al kion oni faras nun stulte en Aŭstralio, nome "vivi kun la viruso", kio signifas lasi la viruson mortigi multajn homojn. Post tio, en la milnaŭcentdudekaj jaroj, ni en Amsterdamo festis la Novjaron tre forte. Dum Kristnasko la katolikoj kaj la protestantoj vizitadis siajn preĝejojn, sed la ateistoj kaj multaj katolikoj nur legis libron aŭ promenis ekstere aŭ iris al la drinkejoj. Sed je Malnovjartago multaj familioj kolektiĝis ĉe siaj geavoj komencante je la sesa horo de Malnovjaro. Oni malmulte manĝis, sed plejparte kartludis, ĝis iomete antaŭ meznokto oni eliris el la domoj kaj atendis la signalon de meznokto. Tiumomente ĉiuj komencis fari multan bruon faratan per la frapado de du kaserolkovriloj. Tio daŭris eble duonan horon, kiam oni reiris kartludi aŭ alion. Sed je la dua horo la avino envenis en la ĉambron kun grandega kaserolo plena da varma miksita manĝaĵo. Post la noktmeza tagmanĝo oni rekomencis kartludi aŭ alion, ĝis kiam la vintra taglumo aperis, kaj oni hejmiradis. Junaj infanoj jam dormis en la avina domo.

Pro la kapitalismo tre multaj homoj estis senlaboraj kaj ne havis iun ajn ŝancon ricevi laborpostenon. Ankaŭ la infanoj sciis, ke ili restos senlaboraj dum la tuta vivo. Ili vizitadis lernejojn specialajn por senlaboruloj, sed ankaŭ tio tre malofte rezultis en laboron. Tio estis ankaŭ mia kazo, ĝis la jaro 1936. Antaŭ tio mi do havis multan tempon por lerni lingvojn, kion mi faris. Tiuj lernejoj estis senpagaj por senlaboruloj. Ankaŭ senpaga estis lerni sportojn, kaj mi lernis boksadon dum du jaroj. Ege malbonajn laborpostenojn oni devis akcepti, ĝis ĝi malsanigis vin.

En la jaro 1934 unu el miaj avoj, la tre kontraŭdia, rigardadis la programojn de la nederlanda katolika radiostacio, kaj aŭdis, ke tiu stacio elsendas ĉiujare semajnan Esperanto-kurson, en kiu s.ro Heilker instruis per la radio kaj sendis lecionojn per poŝto. Mia avo decidis, ke ĉiu el liaj gefiloj kaj genepoj (ne li mem) devis enskribiĝi por tiu kurso de Esperanto, kaj

persone vizitis ĉiun familianon por aŭdi lian devigon. Ne ĉiuj obeis lin, kaj el tiuj kiuj obeis, preskaŭ ĉiuj ĉesis post kelkaj semajnoj aŭ monatoj. Nur restis miaj gepatroj, mia fratino kun sia partnero, kaj mi. Tiuj kvin daŭrigis uzi Esperanton dum sia vivo. Post la fino de la radiokurso mi membriĝis al unu el la dek-kvar Laborpartiaj Esperantoasocioj en Amsterdamo. En tiuj societoj de proks. dudek membroj oni akceptis nur flue parolantajn Esperantistojn; ne flue parolantoj devis unue sekvi severan kurson. Sed dum la unuaj pluraj monatoj mi estis embarasita kaj nenion diris dum la diskutado. Sed mi parolis mense, kaj kiam mi perdis mian embarason oni ne povis haltigi min. Mi estis lerninta paroli dum aŭskultado.

*Marcel Leereveld*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 1a de januaro estis la unua sabato. Venis Ĉhris, John, Roger kaj Ian
La nova jaro komenciĝis kunekun nia unua renkontigo por 2022.
Bondezirojn al ĉiuj por pli malstreĉita jaro.



*Chris Holliss*

# BONA KONSILO

Laŭdire, se vi povas komenci la tagon sen kafeino, se vi povas ĉiam resti bonhumora ignorante dolorojn kaj dolorigojn, se vi povas rezisti tedi homojn per viaj ĉagrenoj kaj afliktoj, se vi povas manĝi la saman manĝaĵon ĉiutage kaj resti dankema, se vi povas kompreni kial viaj karegaj estas tro okupataj por atenti vin, se vi povas akcepti kritikon kaj riproĉon sen senti rankoron, se vi povas konkeri streĉitecon sen medicina helpo, se vi povas malstreĉiĝi sen alkoholo, se vi povas dormi sen helpo de drogoj.....nu, tiukaze vi probable estas la familia hundo! 😄



Traktu ĉiun streĉiteco-plenan situacion kiel traktas hundo: se vi povas nek manĝi nek ludi kun ĝi, pisu sur ĝi kaj foriru!!!!!! Feliĉan Novan Jaron, karaj AE-legantoj. *VERA PAYNE*

## WORLD BEYOND WAR ESTAS TUTMONDA NEPERFORTA MOVADO POR FINI MILITON KAJ ESTABLI JUSTAN KAJ DAŬRIGEBLAN PACON.

La faktoj, kiuj pravigas ke oni fariĝu kontraŭmilita

Milito estas malmorala Milito endanĝerigas nin Milito erozias liberecojn

MILITO ANTAŬENIGAS MALTOLEREMON MILITO MALŜPARAS RIMEDOJN

MILITO MINACAS NIAN MEDION MILITO MALHELPAS NIN ALTERNATIVOJ EKZISTAS

# Virtuala somerkursaro/kongreso

Ĉi semajne komenciĝos la komuna **virtuala somerkursaro/kongreso** de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj (8 - 12 januaro 2022).

Ni tre ŝatus, ke vi partoprenu, almenaŭ en kelkaj el la diversaj eroj. Ni klopodis kunmeti varian kaj interesan **programon**.

(Multajn dankojn, se vi jam aliĝis)

**Bv aliĝi sur nia retejo.**

Estos multaj oportunoj aktive partopreni. Jen ses:

1. Faru fotojn por la kongresa foto-konkurso. La gajnintoj estos anoncataj dum la fina sesio, merkredon, je 20:00.

2. Faru mallongan (malpli ol 10-minutan) videaĵon pri via loko aŭ regiono, por prezenti dum la fina sesio. Tio esperеble iĝos virtuala vojaĝo ĉirkaŭ nia lando. Bonvolu sendi ĝin antaŭe al retejestro@esperanto.org.au.

3. Dimanĉon je 16:00, okazos Alternativa "Diservo". Vi estas invitataj voĉe kontribui inspirantajn legaĵojn, de iu ajn religio, libro aŭ alia fonto. Bonvolu anonci vin antaŭe al Jonathan Cooper, per retejestro@esperanto.org.au. Kvankam bazita sur religia praktiko, tiu sesio estas malferma al ĉiu, ĉu religia aŭ nereligia.

4. Lundon, je 14:00, la prezidanto de UEA, Duncan Charters, mallonge prezentos la nunan situacion de UEA kaj poste respondos al viaj demandoj, eĉ tiklajn. Bonvolu sendi viajn demandojn por Duncan al Jonathan Cooper per retejestro@esperanto.org.au.

5. Mardon, je 20:00, okazos la Arta kaj distra vespero. Ni volas muzikon, teatron, komedion, poezion, dancon. Bonvolu skribi al Sandor per prezidanto@esperanto.org.au.

6. Merkredon, je 17:00, okazos "Montru kaj rakontu". Elektu signifoplenan objekton, kiu havas interesan personan historion por vi, kaj pretiĝu paroli pri ĝi.

Ni tre esperas vidi kaj aŭdi vin sur niaj ekranoj.
Ni ankaŭ petas, ke vi plusendu ĉi tiun mesaĝon al aliaj esperantistoj tra la mondo.

Plej amike,

*Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Sandor, Terry (AEA-estraro)*
*Bradley, David, Ivan (NZEA-estraro)*